**NIA VOĈO**
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es

**MARTO 2010**

## SALUTON EL LA NOVA REDAKTANTO

Karaj legantoj,
Laŭ peto de la lasta ĝenerala asembleo, mi (Manolo Parra) surprenas la taskon redakti Nian Voĉon ekde la nuna numero. Ĝi principe rolas kiel interna informilo de Madrida Esperanto-Liceo, sed ne nur; ĝin ricevas sur papero 11 homoj kaj rete ĉirkaŭ 90.
Espereble ne daŭros longe tiu ĉi mia deĵorado, ĉar komunikemo certe ne estas unu el miaj ecoj. Do jam nun mi alvokas alian volontulon, kiu preparu ĉiumonate jenan dupaĝan bulteneton. Kaj dume, mi petas ankaŭ sendi ĉiujn novaĵojn kiujn vi taksos indaj je publikigo.
Dankon al Lupe Sanz, kiu redaktis dum 25 jaroj.

## MANĜOKUNVENO

Okazis la sabaton 27an de februaro kunveno en madrida vegetara restoracio, kun sekva babilado en plaĉa kafejo. Ĉeestis dektri homoj, du el ili el fora Kartvelio, alinome Georgia.

## KURSOJ

- Pedro A. Hernández gvidas konversacian kurson en la HEF-ejo la vendredojn vespere. Por informiĝi kaj aliĝi, sendu malplenan mesaĝon al la retadreso: esperantovallekas-subscribe @yahoogroups.com

## VIZITO AL MUNKENO

La 21an de januaro Manolo Parra vizitis la Munkenan Esperanto-klubon, dum pro-labora staĝo en proksima urbo. Ĝi kunvenas ĉiusemajne en ĉambro ene de kultura centro, sed la kluba materialo, inkluzive la biblioteko, estas tenata en privataj keloj aŭ mansardoj. Ili donacis libreton "100 jarojn Esperanto en Munkeno", kiu jam eniris la bibliotekon de HEF. El ĝi mi citas: "Verŝajne plej granda problemo estas mankinta propra ejo, kiu helpus neĝenate renkontiĝi, kursestri, prelegi, festi, ktp." Do, madridanoj konsciu la bonŝancon, ke HEF posedas ejon en ĉi urbo.
Ankaŭ en Aŭgsburgo mi renkontis samideanojn. En ambaŭ urboj oni kompleze regalis min kaj ĉiĉeronis por mi.

## EN HISPANIO

NOVA TTT-ejo de KATABRA E-ASOCIO
Ni invitas vin viziti la retpaĝon de KantEA. Ni komencis renovigi ilin okaze de nia 25ª datreveno. http://Kantea.ipernity.com

*(el "Nia Ponto"jan/feb 2010)*

MALFRUA ZAMENHOF-TAGO
25 esperantistoj el 5 urboj celebris en Valencio, fine de januaro, la 150an Datrevenon de la Naskiĝo de Doktoro Zamenhof. S-roj Sempere, Angel García, A.Casquero, Luis Salag parolis pri esperanto antaŭ la bankedo.

**69-a HISPANA KONGRESO. 2a-5a Julio SANTIAGO DE COMPOSTELA**
Kongresejo: Centro Sociocultural de la fundación Caixa Galicia
Provizora programo inkluzivas prelegojn, muzikan koncerton, ekskurson tra la urbo kaj E-diservon en la Katedralo post mallonga pilgrimado. Oni ankaŭ organizos ekskurson al Padrón kaj muzeo-domo de Rosalía de Castro, kaj poste ŝipveturadon tra la estuaro Arousa kaj rivero Ulla.

Aliĝilon kun kotizoj vi ricevas apud tiu ĉi informilo. Kotizo inkluzivas nek loĝadon, nek ekskurson al Padrón kaj ŝipveturadon. Plian informon trovu en www.esperanto.es

**IBERIA RENKONTIĜO**

La 6ª Iberia Renkontiĝo okazos en Almagro, provinco Ciudad Real, de la 9ª ĝis la 11ª de aprilo. Ĝin organizas HEJS, la junulara sekcio de HEF. Ĝia programo enhavas ekskursojn tra la ĉirkaŭo, muzikon, teatraĵojn, noktan diboĉadon, prelegojn, atelierojn kaj, precipe: interkono kun aliaj homoj alvenintaj el pluraj lokoj.
Plia informo: www.esperanto.es/joven

**AMASMEDIOJ**
La 21an de februaro, okaze de la internacia tago de la gepatra lingvo, la regiona televido de Castilla y León elsendis duminutan raporton pri Esperanto, dum kiu parolas kvar elstaraj esperantistoj de Valladolid. Gratulon al ili!

************

La 26an de januaro la radio-elsendejo RNE-5 en sia programero "Vidas contadas" pritraktis la vivon de L. L. Zamenhof.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj **konversaciaj rondo**j okazas ĉiulunde, ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Publika prezento de la nova libro de Antonio Marco “Crónicas del movimiento obrero esperantista”, hispanlingva versio de pli frua esperanta verko. Prezentos ĝin Pedro Sanz kaj Toño del Barrio la sabaton 20an de marto je la sesa posttagmeze en la librejo Traficantes de Sueños, kiu situas ĉe strato Embajadores 35, Local 6.
La libro estas aĉetebla skribante al pedrosanzsateh@gmail.com. Prezo: 8,00 €; se vi mendas tri aŭ pli ekzemplerojn: po 5,00 €.

*************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID